

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 3 2012

Vendredon la 14an de aŭgusto

60a jaro

Kalendaro

Ni komencas je la 19a horo.

Kie? / Hvor? – vd. la lastan paĝon / *se siste side.*

Lundon la 17an de septembro (semajno / uke 38) – **mandag**

Ĉiuj rakontu pri iu sia somera travivaĵo.

Alle beretter om noe de har opplevd i sommer..

Lundon la 1an de oktobro (sem. 40) – **mandag**

La ofta demando "Kiom da homoj en la mondo parolas Esperanton?" Ĉu kaj kiel respondi?

Det klassiske spørsmålet: "Hvor mange mennesker i verden snakker esperanto?" Hvordan svare – eller ikke svare?

Lundon la 15an de oktobro (sem. 42) – **mandag**

Ĉu estas bezono de politike ne-neŭtrala E-asocio en Norvegio, kiu povus membri en i.a. *Norges sosiale forum kaj Forum for utvikling og miljø*, eventuale aligita al SAT?

Er det behov for en politisk nøytral esperanto-organisasjon, som kunne være medlem av f.eks. Norges sosiale forum og Forum for utvikling og miljø, evt. tilknyttet SAT?

Lundon la 5an aŭ lundon la 19an: (sem. 45 aŭ 47): *programo anoncota.*

Lundon la 12an de novembro (sem. 46) – **mandag** (*den andre* i måneden)

.Algis Kaspiravičius prezentos sian lingvon, la litovan.

Algis Kaspiravičius presenterer det litauiske språket.

Lundon la 3an decembro (sem 49) – **mandag**

Raporto de Douglas pri la jar-kunveno de la E-gastigejo en Lesjöfors kaj seminario tie pri internacia komerco per Esperanta.

Rapport om årsmøtet til Esperantogården i Lesjöfors og seminar der om anvendelsen av esperanto i internasjonalt handel.

Lundon la 17an de decembro (sem.51) – *mandag*

Literatura kunveno. Ĉiu prezentu *Litteraturmøte. Alle presenterer en libron.* *Litteraturmøte. Alle presenterer en bok.*

Lundon la 7an de januaro (semajno 2) – *mandag*

Kion ni povos fari en 2013, la *Hva kan vi gjøre i 2013, det norske*
norvega Lingvojaro (200-jara dat- *Språkåret (200-årsjubileet for Ivar*
reveno de Ivar Aasen)? *Aasen)?*

OKAZIS

16. aprilo. **La murdatenco lastjulia.**

Aŭdinte samtage per radio la komencon de la proceso kontraŭ la krimregulo ni kontentas pri tio ke oni rajtigas al li libere pravigi siajn figojn kaj fidas ke liaj argumentoj konvinke refutiĝos. Kaj pri tio ke li ne (plu) estas fordifinita kiel psike malsana, kiel okazis ekz-e al Hamsun kaj Juklerød.

7. majo. **Lastsomere en Danlando.**

Ĉio en la universo konstante evoluas, laŭ la mondkoncepto de Martinus, klarigis Bjørn Øyen, kiu vizitis la Martinus-centron en Danlando lastsomere. Li respondis multajn niajn demandojn pri tio kaj pri Christiania, la libera kvartalo en Kopenhago.

21. majo **Lingvaj eraroj.**

Ni trarigardis kaj diskutis du listojn da "falsaj amikoj" kaj aliaj lingvaj eraroj, kolektitaj el la E-gazetaro,

kelkaj oftaj kaj konataj, aliaj strangaj kaj amuzaj.

4. junio La **jubilea kampanjo.**

Ni diskutis metodojn por disdonado de la kartetoj kun la jubilea interreta adreso kaj informiĝis pri la plano por tutlanda gazetara kampanjo en la jubilea tago 26. julio.

18. junio. **Surtroutuara agado** ne povis okazi, pro pluvado kaj manko de preterpasantoj.

3. septembro. **La Universala Kongreso en Hanojo.**

Kjell Peder Hoff rakontis pri siaj restado en Hanojo kaj partopreno en diversaj aranĝoj en la kongreso kaj montris multajn broŝurojn kaj informilojn, kiujn li kolektis pri E-asocioj kaj -aranĝoj.

DD

La jubile-jara informkampanjo

Jubileumsåret 2012 – info-kampanje

Kartetoj

Ni nun havas abundan stokon da kartetoj (dissenditaj kun *N.E-isto* 2 kaj 4) kiuj montras la jubile-jaran interretadreson esperanto125.com, por disdonado aŭ dispendigado en ingoj sur afiŝtabuloj. Do venu kaj prenu! Aŭ se vi mendos, ni sendos. (La afrankon kovros legaca asigno.)

Ankaŭ **flugfoliojn** ni havas.

La **kurseto** ĉe *Twitter* /**Kvivito** sendiĝas denove: ĉiun tagon aperas lecioneto, (preskaŭ) ĝis la fine de ĉi tiu jubilea jaro. Aliro ĉe la jubilea retejo esperanto125.com.

Jubileumskortene

Vi har nå et stort lager med de små kortene (som alle fikk tilsendt sammen med Norgea E-isto 2 og 4), som viser adressen til jubileumsnettsiden esperanto125.com – til utdeling eller til oppslagstavler. Så det er bare å forsyne seg. Eller vi kan sende i posten (portoens dekkes av bevilgningen fra legatet).

Vi har også løpesedler og plakater.

Twitter-kurset sendes om igjen og går (nesten) fram til nyttår. Du finner fram til det via esperanto125.com.

Elekto de estraro 2012–13

Ankaŭ en la **eksterordinara ĝenerala kunveno** 16. aprilo ni ne sukcesis elekti vicprezidanton, duan sekretarion aŭ vicrevizoron. Ni trarigardis la membroliston. Ĉu iu havas (sin)proponon? Nun jam pasis pli ol duono de la administra jaro. Do ni en la funkcia estraro (elektita por la pasinta jaro) povas nur esperi ke ni ankoraŭ havas la fidon de la membraro daŭrigi ĝis la venonta jarkunveno en marto 2013.

Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? – leie møterom?

Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for én eller flere kvelder? Eller en helg? Vi trenger leieinntekter! Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder kan du få fra kontoret.

El la vendobretaro

Libroj

– Nova kaj tute modernigita eldono de la granda *Bildvortaro* ĉ 300 kr.

– *Kalevala* (la klasike finna eposo) bonkvalite bindita. 90 kr.

– Lars Forsman: *Esperanto ... 50 miljoner träffar*, pri lia 18-jara sperto kiel instruisto pri Esperanto en la popola altlernejo de Karlskoga, (*på svensk*) om hans 18 års erfaringer som esperantolærer på Karlskoga folkehøyskole. 95 kr.

– kaj multaj aliaj lernolibroj, vortaroj, literaturo.

T-ĉemizoj

Verdaj, kun blanka teksto *Vi snakker esperanto. Gjør du?* .

Blankaj, kun verda/bruna teksto *Esperanto er kult.*

Blankaj, kun verda/bruna teksto *Esperanto la internacia lingvo*

Po 100 kronoj, ĉiuj. T-ĉemizo kun E-teksto vekas intereson pri Esperanto!

Glumarkoj: ruĝaj (4 x 7 cm), por valizo, (dorso)sako, teko po 2 kronoj; Ankaŭ (svedaj) kun verda stelo kaj la vorto "Esperanto" en parolveziko (videblas interrete ĉe esperanto.se).

Ankaŭ:

Kun kolora teksto "Mi amas Esperanton". Folio kun 22 por 4 kr.

Kun teksto "Ne krokodilu. Mi parolas Esperanton." po 1 kr.

Insignoj *jakkemerker* 12 mm, verda stelo. Kluĉilo. ĉ 15 kr.

6 mm, kun longa pinglo / *lang nål* 14 kr.

K-disko Esperanto Elektronike. Mirinde amas-enhava. 100 kr.

Kunvenejo ("Esperantonia") Olaf Schous vei 18 (enirejo en Schouterrassen) en Sinsen. Buso 31 aŭ tramo 17 al Rosenhoff kaj de tie iru supren laŭ Båhusveien; aŭ iru malsupren de Sinsen T (buso, metroo) aŭ de la haltejo Sinsenterrassen (nur tramo) laŭ la samnoma flankstrato.

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo.Tlf. 22 35 08 94

www.esperanto.no/oslo

Retpoŝto: <[oficejo\[a\]esperanto.no](mailto:oficejo[a]esperanto.no)>

Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).